

BUĜET-PROPONO por ILEI en 2013

Sumoj rondigitaj ĝis plenaj eŭroj. Kreita: 6 Nov 2012. Modifita laŭ retaj reagoj 10 nov, denove trifoje en Modra 15 nov.

ELSPEZOJ	Buĝeto 2010	Rezulto 2010	Buĝeto 2011	Rezulto 2011	Buĝeto 2012	Buĝeto 2013	
Aktivuloj (afranko, vojaĝoj,)	600	338	600	477	200	250	
Bankokostoj (pro ĝen. kaso)	120	83	120	97	80	100	
Estraro	4200	1626	4300	4594	3400	3900	
afranko, reto, ktp.	1400	1148	1400	1043	1400	1800	
kunsidoj eksterkonf.	2800	480	1500	2341	1000	600	
kunsidoj konferencaj	0	0	1400	1209	1000	1500	
Fakaj kaj aliaj kotizoj	500	456	500	457	400	450	
Honorarioj ĝeneralaj	500	268	500	466	300	300	
Informado, reprezentado	200	19	700	866	500	700	
IPR	7400	8197	7200	7717	7800	8200	
presado	3700	3640	3700	3640	3200	3700	
redaktado	1000	1000	1000	1000	900	900	
sendado	2700	3557	2500	3077	3700	3600	
Juna amiko	6700	5330	6100	5208	5200	5300	
presado	2200	1850	2000	1623	1700	1900	
redaktado, honorarioj	1700	766	1300	950	700	700	
afranko	2800	2714	2800	2634	2800	2700	
Projektoj kaj subtenoj	12800	5484	7900	3121	10400	13650	El kiu, de UEA
Libroj (materialo, presado)	1200	160	200	980	20	450	400
Instruista trejnado fizika/plana	800	500	500	0	700	Sz 1500	1000
Instruista trejnado reta (RITE)	0	0	0	30	800	Sz 800	500
Stipendioj UAM, 3-jara kurso	0	0	0	500	800	Sz 800	500
Afrika agado	4500	500	500	423	2800	AK 4000	500
Latin-amerika agado	500	500	500	0	300	IK 2000	--
Volontula honorario	0	0	2400	1550	1200	1400	1100
Azia agado	0	0	0	--	500	500	500
Projekto e125	0	0	500	15	2300	700	700
Interkulturaj projektoj, SES...	0	0	0	0	1000	200	--
Unu-jaraj aŭ pasintaj projektoj	4500	3984	3000	603	--	--	--
ILEI-lernejo: stipendio	--	--	--	--	--	EL 200	
Eksteraj rilatoj						1100	1000
SUMO:	34 220	21 964	28 120	23985	28 300	32850	6200
	B10	R10	B11	R11	B12	B13	UEA

Indikoj ĉe projektoj pri fontoj de la parto de ILEI: Sz = De Fondajo Szerdahelyi. AK = De la Afrika Kaso. IK = De Interkulturo. EL = De Fondajo Erika Linz. Sen indiko = el la jara spezararo.

Kelkaj sumoj de UEA estas kombinitaj por nia buĝeto: jene:

- Instruista trejnado fizika/plana: 500 por fizikaj kursoj, 500 por la evoluigo de la modulara skemo.
- Volontula honorario: 600 por laŭhoraj elpagoj, 500 por evoluigo de la multlingva retejo.
- Eksteraj rilatoj: 400 por ĝenerala agado; 600 por eldonado de du-lingvaj varbiloj (4 lingvo-paroj)

ENSPEZOJ	Buĝeto 2010	Rezulto 2010	Buĝeto 2011	Rezulto 2011	Buĝeto 2012	Buĝeto 2013
Donacoj ĝeneralaj	500	283	500	479	200	300
Ekzamenoj nete	300	0	0	31	0	0
Konferenco nete	500	- 1296	2000	1809	1500	1400
Kotizoj	8650	8488	9100	8974	7720	8950
A-landoj	6800	5771	6700	6274	5100	6000
B-landoj	1100	1440	1100	1105	1100	1100
Ret-membrecoj	450	942	1000	1202	1100	1500
IPR abonoj	300	334	320	393	420	350
Vendado libroj			500	1451	--	300
Rentumo	50	297	600	692	600	600
Juna amiko	4580	4048	4200	4560	4600	4700
Abonoj	4500	4007	3900	3584	4500	4100
Vendoj kaj donacoj	80	41	300	977	100	600
Projektoj	18000	6650	7000	4633	9300	13500
Disponigo de UEA por edukado	2000	2000	2500	2500	5000	6200
Fonduso Flugiloj 2010 / ESF	500	0	0	1393	0	0
Fonduso Szerdahelyi (trejnado)	500	500	1500	500	800	1100
Interkultura subteno: Juna amiko	1500	297	800	270	500	500
Fonduso Interkulturo	7000	3853	0	0	1000	2000
Afrika Fonduso	0	0	0	0	2000	3500
Erika Linz – libera parto	-	-	-	-	-	200
Volontula honorario	0	0	1200	0	0	0
Deficito (sen deskriboj kaj kurzodiferencoj)	840	2627	4120	1323	4380	3100
SUMO:	34 220	21 964	28 120	23 985	28 300	32 850
	B10	R10	B11	R11	B12	B13

Komentoj

La estraro ricevis de nia antaŭa kasisto serion da ciferoj por la rezultoj el 2012. Tiuj estas ankoraŭ provizoraj; la jaro ja ne finiĝis. Tamen pri enspezoj pro membriĝoj kaj abonoj la ciferoj proksimas al la definitivaj. Nur post la fino de la jaro ni povos prezenti tiujn rezultojn. Sed la provizoraj ciferoj forte helpis al ni formuli realisman buĝeton por 2013.

Nia nova kasisto bone enhejmiĝas en la taskojn, dank' al aktiva helpo de nia antaŭa kasisto. Al Julija Batrakova la ligo ŝuldas grandajn dankojn, ne nur pro la kapabla mastrumo de la kontoj tra tri jaroj, sed ankaŭ pro la preteco fintrakti la financojn ĉe nia Konferenco 2012, kaj la entuta kontaro por 2012.

Forte helpis nin en la kompila laboro la frua certeco pri la nivelo de la eduka disponigo de UEA por 2013. Tio sukcesis ĉar ILEI elpaŝis fari konkretan proponaron jam en junio 2012, pli frue ol la Komitato de UEA benas sian buĝeton dum UK. Estas konsilinde, ke la Ligo ĉiujare agu tiel, por ke ni formulante la propran buĝeton en oktobro jam sciu la sumon je dispono ĉe UEA, kaj por ĝiaj propraj edukaj planoj, kaj por tiuj realigendaj flanke de ILEI.

Ni bedaŭras, ke nia buĝeto neeviteble antaŭvidas deficiton, sed ĝojas, ke ĝi estas malpli ol tiu de 2012. La nomumigo de estrarano pri varbado donas al ni fidon pli optimismi ĉe la enspezoj pro membriĝoj kaj abonoj por *Juna amiko*.

La Estraro rekomendas ĉi tiun buĝeton al la Komitato por aprobo per reta voĉdono.